Statuto
de
Esplora Instituto de Esperantologio

Art.1. Nomo kaj Sidejo.
La nomo de la institucio estas “Esplora Instituto de Esperantologio” (EIE), kun sidejo en la Skandinava Esperanto-Domo, Stiftelseväggen 1, 682 60 Lesjöfors/Filpistad, Svedio. La establo havas juran personecon laŭ la juro de tiu ĉi lando.

Art.2. Celoj kaj taskoj.
EIE estas sendependa idealisma socieo sen profita celo. Ĝiaj celoj kaj taskoj estas, ene de la ĝeneralaj principoj de la Esperanta Civito:
(1) Organizi transnacian ferian altlernejon pri ĉiuj sciencoj aplikitaj al esperanto.
(2) Iniciati, kuraĝigi kaj konsili pri kulturaj projektoj en esperanto.
(3) Agadi kiel organiza referenco de instruistoj, trejnistoj, staĝantoj kiuj uzas esperanton je C-grado laŭ la Komuna Eŭropa Framo de Referenco establita de Konsilio de Eŭropo.
(4) Subteni eldonaĵojn kaj amaskomunikilojn per originalaj sciencaj/edukaj esploroj.
(5) Entrepreni kaj aŭspicii aliajn agojn por la properigo de la ĉi-supraj celoj de EIE.

Art.3. Financoj.
3.1. La financan (materian) bazon de la establo formas (i) la kapitalo, (ii) la ĉiujaraj enspezoj, (iii) la fondaĵoj.
3.1.1. La kapitalo konsistas el legacoj kaj donacoj de institucioj aŭ individuaj mecenatoj. La kapitalo esta netuŝebla krom en okazo de dissolvo de EIE laŭ Art.9.
3.1.2. La ĉiujaraj enspezoj konsistas el interezoj de la investita kapitalo kaj el regulaj kontribuoj de institucioj aŭ individuaj mecenatoj.
3.2. La membroj de EIE materie ne respondecas pri la ŝuldoj de EIE.
3.3. La financojn de EIE prizorgas la Kasisto de EIE, kiun nomumas la Estraro.
3.4. La kontojn de EIE kontrolas revizoroj elektitaj de la Asembleo de EIE.

Art.5. Membroj.
5.1. Membroj de EIE estas
a) la docentoj nomumitaj de la Estraro, inter kiuj la kunordiganto estas ankaŭ estrarano;
b) ĉiuj individuaj donacantoj.
5.2. Membro estas eksigeblaj, se ili konscie malobservadis la Statuton, aŭ se ili agis publike aŭ kaŝe kontraŭ la celo de EIE, aŭ se ili pro malhonora ago estis kondamnitaj de leĝa tribunalo al puno de mallibereco.
5.3. Eksigo okazas per propono de la Estraro kaj laŭ decido per absoluta plimulto de la EIE-anoj en skriba, sekreta voĉdonado.

Art.4. Asembleo.
4.1. La Asembleo de EIE koincidas kun la kunveno de la docentoj agnoskitaj de la Estraro.
4.2. La Asembleo kunsidas unu fojon jare sur teritorio de la Eŭropa Unio.

Art.6. Estraro.
6.1. La administrado, direktado kaj gvidado de la aferoj de EIE estas prizorgataj de Estraro minimume tri-membra, konsistanta el la Prezidanto, la Vicprezidanto, la Sekretario. La Kasisto povas esti ekstera al la Estraro.
6.2. La oficoj de la Estraro estas sensalajraj, sed la Estraranoj havas rajton de kompenso pro necesaj elspezoj.

6.3. Decidoj el la Estraro okazas per plimulto de voĉoj. Okaze de nombroegaleco la Prezidanto havas decidan voĉon.

Art.7. Elektoj de la Estraro.
Elektoj por la postenoj de EIE okazas ĉiun trian jaron, sed EIE povas per plimulto de la voĉdonantoj esprimi malkonfidon al la Estraro antaŭ la forpaso de la trijara periodo.

Art.8. Ŝanĝo de la Statuto.
La Statuto estas modifebla per simpla plimulto de ĉiuj membroj.

Art.9. Dissolvo.
EIE povas esti dissolvita laŭ decido de du trionoj de ĉiuj membroj laŭ sekreta voĉdono. En okazo de dissolvo la lasta Estraro prizorgas la likvidon de aventualaj ŝuldoj laŭ la juro de la lando de la sidejo kaj decidas pri la transdono de la restantaj materiaj rimedoj al alia internacia aŭ nacia establo, aŭ institucio kun celoj kiel eble plej similaj al la celoj de la dissolvita establo. Plenuminte tiujn taskojn, la Estraro ĉesas funkcii.

Art.10. Fondo kaj Ekfunkciigo.
10.1. Esplora Instituto de Esperantologio estas fondita la 8-an de decembro de 2025, kiam kunsido de tri membroj konstatante la plenumon de la meciitaj kondiĉoj en ĉi tiu Statuto, decidis fondi la establon.
10.1.2. EIE estas gvidata provizora estraro, kiu okazigos la elektojn konforme al ĉi tiu Statuto.

Stokholmo la 8-an de decembro 2025